"Certege ne!" indignis Alicio.

"Do, malgraŭ ĉio, la via ne estis efektive altranga, bonstila lernejo" diris triumfe la Falsa Kelonio. "En la nia, oni ja presigis ĉe la kontfino:

'La franca lingvo, la muziko, kaj la *vest-lavado*—ekstraj.'"

"Laŭ mi, vi ne multe bezonis la vestlavadon" diris Alicio "ĉar vi vivis sur la marfundo."

"Miaj gepatroj povis pagi nek por tiu ekstraĵo, nek por la aliaj" la Falsa Kelonio diris ĝemante. "Ili pagis nur la ordinarajn kurspagojn."

"Kiajn temojn la ordinara kurso enhavis?" Alicio demandis.

"Por komenci" respondis la Falsa Kelonio "La Libro-lekado kaj la Plumskrapado; ankaŭ la diversaj fakoj de Aritmetiko—Ambicio, Korpremo, Multimpliko, kaj Diveno."

"Pri Multimpliko" Alicio kuraĝis diri "mi neniam aŭdis. Kio ĝi estas?"

La Grifo levis surprize ambaŭ birdpiedojn. (Li ankaŭ havis en la posta parto du best-piedojn—vidu la ilustraĵon.)

"Kion?" Ĝi ekkriis "neniam aŭdis pri Multimpliko kaj tamen scias pri la Divenarto? Nu tiu arto kaj la arto multimpliki estas reciproke konversaj; kaj nur postkiam oni *multe* praktikis implikon, estas permesate eĉ komenci



la arton diveni. Diveno sen a
estas ja tute senvalora. Tamen
Multimplikon, pretendas bone ko
Eĉ idioto ne kredus tion."

Alicio jam ne havis la kuraĝo
plu al la Grifo pri la marlerne
Turnante sin for de li, ŝi de
Falsa Kelonio:

"Kion alian vi devis lerni?"

"En la unua loko, la Misteroj
Falsa Kelonio kalkulante la te
piedaĵoj, nome Mistero Antikv
Moderna: ankaŭ la Disigarto.
instruisto estis maljuna angilo
unufojon en ĉiu semajno; li inst
ĉiujn objektojn, ĉu ebenaj, ĉu soli
*florbildojn.*

"Kiamaniere oni faris tion
Alicio.

"Nu, la detala klarigo estus ja
la Falsa Kelonio "tamen mi c
niaj lernejanoj, se ili bezonus, e
blankajn rozojn (kiel hodiaŭ la
la Damo) tre hontus uzi ilian
eĉ por ruĝigi la Damon me
metodo estus multe pli bonartista
Eble la Grifo volos aldoni pluan

"Mi ne povas" diris la Grifo "
da tempo mi neniam lernis la

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURST